1re Année. N° 11. Le Numéro : 10 cts. Décembre 1911.

# LA DEKSEPA

Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVIIe Arrt
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

## Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVIIe Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

### Notre Diner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu les Mercredis 6 Décembre 1911 et 3 Janvier 1912, à 8 heures précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

### Prochaines causeries.

6 Décembre. — Diner mensuel, suivi de jeux espérantistes.
13 Décembre. — Köln (lumbildoj), S-ro L. Chilard.
20 Décembre. — Ĥinlando, ĝiaj kutimoj (lumbildoj), S-ro H. van Etten.
27 Décembre. — Tra la Savoie'a regiono (lumbildoj), F-ino Desprès.
3 Janvier 1912. — Diner mensuel, suivi de jeux espérantistes.

*Le Secrétaire :* ROBERT BOLLACK.

## Literatura Konkurso de la " Dek-Sepa ".

La Redakcio de la « Dek-Sepa » memorigas al la malfruiĝintaj konkurantoj, ke la lasta templimo de la konkurso estas fiksita ĉe la fino de la monato de Decembro. La temo estas originala novelo havanta 4-5 paĝojn, kun ekskluziva uzo de la radikoj entenataj en la « Universala Vortaro » de la Fundamento.

La manuskriptoj ne devas porti subskribon de l' aŭtoro, sed nur ian pseŭdonimon aŭ devizon. La nomo kaj adreso estu skribita sur aparta folio kaj sin trovu en aparta koverto, kiun oni malfermos nur post la rezolucio de l'juĝantaro.

## ĈE LA DEK-KVINA KVARTALARO DE PARIS

Niaj amikoj de la Sekcio de la Dek-kvina Kvartalaro de la Grupo Esperantista de Paris organizis, la 19-an de Novembro, propagandan feston, kiu sukcesis treege.

Dum tiu kunveno, S-ro Paul Aubriot, deputato de la dek-kvina kvartalaro de Paris, post la promeso, ke li aliĝos al la Esperantista Grupo de la Franca Deputatejo, certigis la multnombran ĉeestantaron pri la taŭgeco kaj la utileco de nia kara Esperanto kiel lingvo, kaj kiel interpopola pacigilo.

Tondregon da aplaŭdoj ricevis tiuj vortoj de S-ro Aubriot.

Lin ni povas, de nun, konsideri kiel anon kaj defendanton de nia Zamenhofa lingvo.

ROBERT BOLLACK.

**Avis très important.** — L'Atesto pri Kapableco aura lieu le Vendredi 15 Décembre, à 8 heures très précises du soir, à la Sorbonne, Faculté des Lettres, Salle 5 (entrée : rue de la Sorbonne).

## ERRATUM

Ni petas niajn legantojn, ke, en la « Dek-Sepa » de Novembro 1911, paĝo 5, linio 22, anstataŭ : « ni, liberamantoj devas tion zorge eviti », ili bonvolu legi : « Ni, liberamantoj devas tion zorge **mediti** ».

Tre certe, niaj legantoj estos korektintaj tuj post la legado. *N. d. l. R.*

Acrostiche fait par notre vice-président, M. Ollivier :

Van Etten
ObIIn
OlliVier
CoUsens
Lhermitte
DAniel
Henri De Coppet
MilliEn
BollacK
RoSa Talvat
LemoinE
Poublanc
ChilArd

# LA MONATO ESPERANTISTA

Kvankam estas por mi tre agrabla tasko provi interesi vin pri la movado esperantista, tiun ĉi monaton, mia agrabla devo fariĝas tre malfacila, ĉar mi raportos pri la kongreso en Antverpeno.

Duoble malfacila ĝi estas, ĉar, kiel oni diras france : *toute vérité n'est pas toujours bonne à dire,* mi devas kiel eble plej proksime kaj senpartie sekvi la Veron.

Ankaŭ dependas de la celo, kiu gvidas kaj alvokas vin.

Se la celo estas pri la propagando de Esperanto en la tuta mondo, pri la festoj, kiuj mirinde sukcesis, pri la nombro de la ĉeestintoj, pri la impreso, kiun la urbo Antverpeno certe ricevis, la Kongreso de Antverpeno estis bonega.

1) Ĝi estis nia VII-a Kongreso.

2) Kunveniĝis pli ol 2000 kongresanoj.

3) La festoj estis sukcesegaj.

4) La urbo estis plenigita per Esperantaĵoj, la urbestraro akceptis nin, monhelpis nin, kaj faris ĉion eblan por sukcesigi nian ĉiujaran konferencon.

Jen la programo de nia granda Esperanta semajno :

La solena malfermo de l'Kongreso okazis la 21-an de Aŭgusto en la festhalo de la Zoologia Ĝardeno. Kiel kutime, D-ro Zamenhof elparolis sian ĉiujaran paroladon, kiu estis multe aplaŭdita.

Dum la sama kunveno, Kapitano Perogordo donacis al D-ro Zamenhof la ordenon de Komandoro de « Isabelle la Catholique ».

Tri kunvenoj estis plenigitaj per diskutadadoj kaj la Kongreso estis fermita.

Feliĉe, meze de tiuj disputoj, la festoj ne mankis, koncerto aranĝita de la Esperantista Vagabonda Klubo, prezentadoj de « Devo de Reĝo » kaj « Por kvietaj personoj », kiuj estis bonege luditaj. « Kaatje », kiu havis du prezentadojn, kaj kies aktoroj estis el la Nederlanda Reĝa Teatro.

La Literatura Konkurso tre brile sukcesis, fine, de la vidpunkto *ekstera* ĝi estis sukcesego.

Sed, vi ĉiuj scias, ke la ĉefa afero pritraktita de l' Kongreso estis la demando pri oficiala reprezentantaro, kiun la Angloj formale estis malaprobintaj dum la Brita Kongreso en printempo pasinta, per 400 voĉoj kontraŭ 5 aŭ 6 ! !

Tiam staras dua celo, kiu gvidas min.

Estas la celo de la Vereco kaj de la honesteco.

Neniam, mi bedaŭras diri, la « eminentuloj » pli ŝajnis malami, eĉ ignori, kio estas persona libereco kaj vereco. Pri tio, la kongreso estis malbonega.

La diskutoj pri tiu afero estis bruegaj, konfuzaj ; por pravigi min, la gazeto *Esperanto* diras (paĝo 259) :

« Ni klarigos nian opinion pri la projekto de U. E. A. Ni faros tion pli volonte, ke dum la Sepa, ne estis al ni eble publike defendi nian projekton — pro la direkto trudita al la debatoj.

« Mi ne volas aŭdigi plendojn kaj komenci polemikojn — tio ne estas nia kutimo — sed mi havas la devon konstati, ke :

« 1-e. Malgraŭ nia penado, la demando pri internacia organizo de la Esperantistoj, neniam povis esti klare diskutata kaj regule esplorata en plena maniero. La diskutado estis abortigata.

« 2-e. Eĉ ne sciante, ĉu la *kongresaj* rajtigitaj delegitoj aprobas aŭ ne aprobas la principon de tia internacia organizo, oni fakte faris tiun organizon aŭ almenaŭ kreis ĝian

fundamenton, aldonigante al simpla regularo de *dumkongresa* rajtigita delegitaro la vorton kotizaĵo (kio en si mem nepre entenas la ideon pri organizaĵo). Tiamaniere la rajtigitaj delegitoj fakte starigis internacian organizaĵon, antaŭ ol scii, ĉu ili volas ĝin kaj kiel ili ĝin volas.... Komparu tion kun la situacio de Konstituantaro, kiu voĉdonus la regularon de Parlamento kaj la impostojn antaŭ ol scii, ĉu oni starigos respublikon aŭ monarkion !

3-e. Neniu povis respondi al ni, ĉu oni volas fari internacian organizaĵon de la *propagandaj* organizaĵoj aŭ de la *tuta Esperantistaro* ?

« 4-e. La diskutoj de la rajtigitaj delegitoj estis tro ofte konfuzaj kaj neregulaj. Ĉe la eliro, ni ofte aŭdis personojn, kiuj ne ĝuste sciis, por kio oni ilin voĉdonigis. Ŝajnas al mi, ke tiu imito de parlamento — kun ne informitaj personoj kaj ne klare prezentitaj temoj — ne liveris speciale bonajn rezultatojn. »

Jen alia gazeto : *Espero Katolika* per la voĉo de Pastro Richardson diras : « Esperanto ne limiĝas al Grupoj, sed ankaŭ al izolitaj Esperantistoj kaj grupetoj, kiuj neniam aliĝos al nacia societo kaj kiuj tamen faras bonegan laboron kaj ili ne estos reprezentataj. »

Fine, Pastro Richardson, pli aŭ malpli malaprobas la projekton.

El *Germana Esperanto-Gazeto,* la raportinto diras :

« *Mardo,* la 22-a de Aŭgusto 1911. — La delegita kunsido en la salono de la Reĝa Ateneo estis malfermata je la 4 h. 35 de S-ro Rollet de l'Isle. *D-ro Zamenhof parolis pri la formo de delegiteco kaj deziris, ke ĉiu elparolu sian opinion libere, kio poste montriĝis neebla.* Chavet, ĝenerala sekretario de la Konstanta Komitato, parolis pri la formo de voĉdonado, kaj fine, post longaj diskutadoj, propono pri delegiteco estis akceptata, *dum la plimulto tute ne voĉdonis.* Post interdiskutoj kaj klarigoj de S-ro Chavet pri la Internacia Konsilantaro art. 3 de la *statuto same estis aprobata, sed la plimulto de la ĉeestantoj ne voĉdonis.* Ĉe la diskutado pri art. 4 okazis interesa duelo inter D-ro Zamenhof kaj Hodler, Bourlet, Rousseau kaj Mudie. Fino je la 6 h. 35.

« ... *S-ro Privat proponis, ke oni oficialigu la " Fundamenton " kaj rikoltis multajn aplaŭdojn.* D-ro Zamenhof donis la manon al la parolinto, sed opiniis tiun aldonon ne dezirinda. Post diskutoj S-ro Privat fine ne plu ricevis la

parolon por respondi, kaj propono de S-ro Mudie pri ampleksigo de la tagordo estis malakceptata (je nia granda miro, ĉar tio estas la sole ebla parlamenta metodo). »

Kiam oni proponis liston por Speciala Komisiono por studi la aferon, oni zorge evitis S-ron Th. Cart kiel tro ĝenanta, pro tio *Germana Esperanto-Gazeto skribas* :

« Komencis duhora diskutado pri tiu listo. Privat proponis elekti nur 5 anojn, sed tiu bonega propono estis malakceptata — *verŝajne nur pro la proponitaj nomoj*. D-ro Zamenhof proponis akcepti la liston, multe tro longan kaj nebone kunmetitan, sed fine akceptatan. »

Feliĉe, pro la formala peto de D-ro Dor, per ĉies aplaŭdoj, la nomo de nia amiko Cart estas en la listo.

Ĉu oni kredigos al iu, ke projekto, kiun oni voĉdonigis per surprizo (kiel vi povis konstati laŭ la supre cititaj eltranĉaĵoj) havos en la estonteco ian valoron inter la esperantistaro ? Certe ne. Tia projekto mortis antaŭ ol naskiĝis.

Por fini, mi citas la lastan parton de artikolo titolita « Internacia Reprezentantaro » de la Ĵurnalo *Danubo*, n-ro 10, Julio :

« Konklude, ni diros, ke nun ni absolute ne bezonas tian organizaĵon, ĉar ĝi ne povos realigi siajn *publikajn* planojn. La ĝisnunaj projektoj estas pli danĝeraj ol utilaj por la akirita prospero, estas danĝeraj ankaŭ por nia estonta movado. La esperantistaro ne sentas bezonon de organiziĝo. Ĝin oni lasu libera, ke ĝi vivu, disvolviĝu kaj kresku libere ! Ĝin ligas plej perfekte nia bela idealo, kaj pro tio ĝi ĉiam preferos tutforte helpi bonajn entreprenojn, ĉu naciajn, ĉu internaciajn, kaj tial oni ne klopodu ĝin ligi per leĝoj kaj monarĥaj disciplinoj ! La esperantistaro estas *libera popolo* kaj tial ĉia altrudaĵo de oficiala karaktero al ĝi, alportus nur perdon al nia kolosa movado.

Ekzistas nur unu sola, necesega disciplino — la morala. Ĝin la esperantistaro senhezite akceptis en la kongreso de Boulogne-sur-Mer kaj grandega anaro hodiaŭ ĝin pie respektas. Tiun disciplinon ni ne devas ignori, sed male — kun amo kaj fervoro ni ĝin gardu kontraŭ makuloj kaj laŭ ĝi kondutu. Ĉu io alia, eĉ pli aŭtoritata, povus nin tiel harmonie, tiel sukcese alkonduki al triumfo ? Sendube ne !

Se eble iu protestos, ke ne la plano estas tia de la projektistoj, ĉar tiuj ĉi certigas, ke la estonta organizaĵo estos nur *Administracio,* kiu neniel sin okupos pri lingvaj de-

mandoj. Ho! se tio estus tiel, ni ankaŭ kontraŭ ĝi plendus, ĉar oni ne rajtas kontroli la aferojn de la esperantistaro. Sed ne tio estas la esenco de la projektoj. En la projektoj apud ĉi tio sin kaŝas ankaŭ aliaj sopiroj ne tre dezirindaj. Tio nin igas konjekti, ke multajn eminentajn samideanojn ne ankoraŭ instruis la praktiko kaj ĉefe la fakto dum la 1907-a jaro, kiam perfidaj glorenviuloj volis detrui la esperantistan movadon.

Regemecon en Esperantujo oni senhezite devas forjeti. Tio estas la kondiĉoj de nia estonta prospero. Ne la regemuloj instigos la esperantistojn al laboro; ne ili povas meti ordon en la programojn de la liberamaj homoj.

Tia estas mia opinio.

HENRY VAN ETTEN.

# INTER NI

Diketa, brunbarbula, bruema, imitanta, ciam panon manĝanta. Kiu?

☆

Baldaŭ rekomenciĝos la projekcioj. Ni ĉiuj atentu kaj venu amase aŭdi la oratorojn.

☆

Nia sekcio havis la ŝancon esti vizitata de germana samideanino, Fraŭlino Schäfer, el Königsberg.

☆

Kiom granda estis nia ĝojo, vidinte S-ron Mauchamp, la esperantista « globe trotter » altabliĝi ĉe nia lasta vespermanĝo!

☆

Bonega amikino, terura malamikino!! humoro ŝanĝanta kiel la vetero, blanka ĉapeleto, verda postuketo. Kiu?

☆

Oni sciigis al mi, ke se la Prezidanto de la Pariza Grupo ne ĉeestis la lastan ĝeneralan kunvenon de la 17-a, estas pro tio, ke li ne estis ***persone*** informita pri ĝi. Mi sincere bedaŭras lian neĉeeston, ĉar li estus vidinta, ke niaj decidoj estis regule alprenitaj.

**FUŜISTO.**

# La Kristnaskaj Lekantoj.

(LAŬ LEGENDO POPOLA)

La tutblankaj lekantoj briletas en la verda herbo kaj la malriĉaj paŝtistoj de Judeo iras kun siaj brutaroj laŭ la direkto al ili donita de la stelo de Dio. Ili marŝas en la matena roso, kaj pensas pri la dia Mesio de longe atendita, kiun ili baldaŭ vidos kaj adoros. Ili marŝas ĝoje, dum siaj karaj ŝafidoj saltas antaŭ ili sur la longaj vojoj inter la tutblankaj lekantoj, kiuj briletas en la verda herbo.

La stelo ĉiam brilas en Kristnaska ĉielo, kaj la paŝtistoj aŭskultas la kantojn de la anĝeloj, kiuj kantas: « Gloro al Dio en la plej altaj lokoj, kaj paco sur la tero al la homoj bonvolaj! » La humilaj paŝtistoj forgesas, en sia ĝojo, la longajn laborojn, la klopodojn dolorajn, la malesperojn pasintajn; ili forgesas ĉion, krom sia kara espero pri la baldaŭa savado de l' mondo, kaj ili komparas la stelon brilantan je la tutblankaj lekantoj, kiuj briletas en la verda herbo.

Kaj unu el ili subite ekpensis: « Kion ni oferos al la Dio novnaskinta, kion ni donacos al li? Per kiaj oferoj ni vidigos al li nian tutan amegon? Ni havas nek oron, nek multekostajn ŝtofojn, nek diamantojn; ni havas nur, en nia malriĉeco, niajn humilajn ŝafojn, kiujn ni kondukas sur la kamparo. Kio plaĉus al la dia infano? Kia donaco alportus iom da ĝojo kaj da feliĉo en la stalon malvarman kaj malhelan?...

Kaj la paŝtisto pensadas tre longe, rigardante ĉiam sed senatente la tutblankajn lekantojn, kiuj briletis en la verda herbo.

Kaj li pensis: « En tiu malbela vintra naturo mi nur vidas ion belan: tiujn malgrandajn florojn, kies blankeco ĝoje brilas kaj kiuj similas per siaj formoj, je steloj defalintaj de la ĉielo. Mi amasos multe da tiuj floroj kaj ilin donacos al la Sankta Virgulino ».

Tiam, la paŝtisto malleviĝis kaj dum la tuta tago li deŝiris, deŝiris la floretojn, la tutblankajn lekantojn, kiuj briletis en la verda herbo.

La tagon morgaŭan, la paŝtistoj estis en la stalo kun siaj brutaroj. Jam ĉirkaŭ la dia infano, reĝoj, princoj, urbanoj estis kaj preĝis fervore. Kaj la reĝoj prezentis al li siajn donacojn riĉegajn.

La ŝafidoj kuŝis sur la pajlo kaj la juna Dio ridetis feliĉe.

Sed paŝtisto proksimiĝas al la lulilo kaj al la Sankta Virgulino kaj subite li disjetis, ĉie, en la stalo, ĉirkaŭ la infano kaj la adorantaj, grandajn amasojn da tutblankaj lekantoj, deŝiritaj de li, en la verda herbo.

« La donacoj de la reĝoj estas tro belaj, pensis la paŝisto. Jesuo ne atentos pri mia humila ofero. » Kaj la malriĉulo rigardis malgaje belan oran kronon alportitan al la infano. Sed subite, li vidis Jesuon, kiu forpuŝis la diamantojn kaj la belegajn ŝtofojn, forpuŝis la riĉajn donacojn ! ! Jesuo prenis malrapide, en sia rozkolora mano, floreton blankan, kaj portis ĝin al siaj lipoj, kaj ĝin kisis ridetante ! kaj la paŝtisto, kompreninte, inklinis sian kapon, adoris humilege, dum la kantoj de la anĝeloj fariĝis pli triumfaj en la ĉielo ! !

De tiu momento, por memorigi ĉiam pri la dia kiso, la tutblankaj lekantoj, kiuj briletis en la verda herbo, la lekantoj tutblankaj havas oran koron ! ! !

*Tradukis* ***Gabriel Chavet.***

# PRI LA MORTPUNO

Antaŭ ĉio, mi volas diri al vi, ke mi ne pretendas solvi la demandon pri la mortpuno. Cetere, mi havas nenian kapablon por ĝin fari. Mia tuta celo estas nur prezenti kelkajn personajn opiniojn pri tiu temo.

Estas sufiĉe, ke oni legu en kiu ajn ĵurnalo, por ke oni vidu, ke ĉiutage okazas mortigo. Mortigo estas nun afero tre ordinara, kiu tute ne mirigas nin. Cetere, ĉar multaj Parizanoj (mi mem, inter krampoj), portas sur si revolveron, mi povas diri, ke ĉiuj el ni povas fariĝi mortiganto, se okazo prezentiĝos. Tamen mortigo estas kompreneble terura afero, precipe ĉar ĝi estas neriparebla, kaj estas necese, ke societo sin defendu kaj punu severe la mortigintojn.

Tie mi dividos la mortigintojn en du klasoj. En unua klaso mi apartigos tiujn, kiuj mortigis pro kaŭzo pli aŭ malpli malbona, sed tamen pro kaŭzo iom komprenebla. Mortigo estas preskaŭ pardonata kiam oni defendas patrujon kontraŭ malamikojn aŭ sin mem kontraŭ nokta atakanto. Pro ĵaluzo, pro venĝo, ankaŭ mortigo estas kelkafoje komprenebla.

Tiuj mortigintoj estas la malpli danĝeraj, ĉar ili mortigis, sed ne plu mortigos. Mi nomas ilin: *mortigintoj* kaj ne *mortigistoj*. Societo ofte malliberigas ilin dum daŭro pli aŭ malpli granda kaj efektive tiu puno estas sufiĉe grava por homo konscia.

En dua klaso, mi apartigos tiujn, kiuj mortigis pro nenia kaŭzo aŭ pro kaŭzo, kiun ni ne povas kompreni, ekzemple mortigo de infanoj, kiel Jeanne Weber kaj tiel plu. Tiuj estas la plej danĝeraj kaj mi nomas ilin ne mortigintoj, sed mortigistoj, ĉar dum sia tuta vivo ili mortigos senĉese.

Laŭ mia opinio, ili estas puŝataj de mi ne sciaa kia terura fatalo, kiun ili ne povas kontraŭbatali. Mi havas kontraŭ ili nenian malestimon, sed nur plendon. Ili estas malsanuloj, kies malsano estas terura, kaj terura ne por ili mem, sed por ilia proksimulo.

Ĝis nun, la societo estas tre mallerta pri tiuj lastaj. Malofte ĝi mortpunas; jen ĝi malliberigas ilin en frenezulejo, jen ĝi sendas ilin en malproksiman landon. Post pli aŭ malpli da tempo, ili fariĝos liberaj, revenos por mortigi; kelkafoje oni helpas ilian edziĝon kun alia sentaŭgulo kaj ili naskas infanojn ankaŭ malsanaj.

Kompreneble, tiu solvo ne estas bona. Sed ĉu societo havas rajton mortigi? Se ĝi estus perfekte aranĝita, sendube la respondo estus nea. Malsanulo ne devas esti mortigita, sed kuracata. Sed, en nia nuna societo oni ne povas konstrui specialajn malsanulejojn por mortigistoj. La mono elspezita por tio estus multe pli utila ekzemple por aliaj malsanuloj, kies malsano estas danĝera por ili mem, kaj por la malriĉuloj.

Plie, por malsanuloj, kiuj ne povas resaniĝi, ĉu morto ne estas dezirinda? Cetere, societo ne devas mortigi homon, sed ĉu tiuj mortigistoj estas homoj? Tute ne, kaj la societo povas diri al ili: « Vi estas kiel rabia hundo, ĉar mi ne volas esti mortigata de vi, mi vin mortigas ».

Estas preferinde tranĉi membron putritan ol lasi putriĝi la tutan korpon.

Kelkaj pensis pri interesa solvo, dirante ke mortigistoj povus utili por kuracistoj, kiuj volus eksperimenti novajn kuracilojn. Oni dirus al la punito: « De nun, vi ne plu ekzistas, vi estas kiel malvivulo, mi inokulos al vi sifilison, peston, k. t. p. kiel eble plej ĝentile, kaj mi provos vin kuraci. Kiam vi estos teditaj pri la vivo, jen veneno; ciana acido ekzemple, vi tuj estos liberigitaj je viaj suferoj ».

Sed mi pensas, ke oni devas forigi plej eble la suferojn por la mortonto. Kial ne demandi al li kian morton li preferas ?

Unuaj petos venenon, aliaj volos malfermi siajn vejnojn banante, aliaj pli delikataj petos asfiksiĝi per floroj.

Se iam mi estos mortpunota, mi volos esti pendigita, por ke miaj samideanoj konservu la ŝnuron.

*Georges Lhermitte.*


☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

KONTRAŬ **MAR-MAL-SANO**

# DELPHININE

KONTRAŬ **FERVOJ-MAL-SANETO**

De l' DOKTORO FLASSCHŒN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : **10** fr. (**4** S).

**Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.**

# LA VERA TIZANO DE L'PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : **1** Fr. **50** (Sm. **0,60**)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

**Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.**

# DANUBO

**Organo de la rumanaj kaj bulgaraj esperantistoj**

**Internacia monata gazeto (32 p., 16×24), nur en Esperanto.**

Redaktata de speciala komitato, kun la kunlaborado de eminentaj diverslandaj esperantistoj.

**Enhavoriĉa. — Fundamenta stilo.**

**REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO :**

**5, Str. I. C. Bratianu, BUCURESTI (Rumanujo).**

*Jara abono* : **3,50 fr.** *(1,40 S).*

Specimena numero kontraŭ respondkupono.




*Véritable*
*Sel Ferrugineux*
*assimilable*

DÉCOUVERT PAR

**M. Maurice ROBIN**

*en 1881.*

# LE Fer Robin

*est Souverain*

CONTRE

**l'ANÉMIE,**
**la CHLOROSE,**
**les HÉMORRHAGIES**
**DE TOUTE NATURE**

**Active la nutrition et ne constipe jamais.**

Chaque Flacon de ce médicament dépourvu de toute saveur, et qui se prend à la dose de 10 à 30 gouttes par repas, dans un peu d'eau ou de vin, représente une durée de trois semaines à un mois de traitement.

**Pour éviter les Contrefaçons EXIGER le Nom de ROBIN**

VENTE EN GROS :

**13, Rue de Poissy, PARIS**

Le Gérant : E. Ollivier.

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.